

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

N.E.L.E. (Nia Estas La Estonteco)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
Rm. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)

Officieel Orgaan
van den

Vlaamschen
Esperantisten -
Bond



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Postêekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque.	Fr. 55,— bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,— »
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,— »
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,— »
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,— »
Si — H. Rider Haggard	29,— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10,— »
La Ĝu Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,— »
.Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,— »
La Homaj rasoj de la Mondo	24,— »
Kudlago, la malgranda eskimo	5,— »
La Juna Vivo (1934-1935)	15,— »
Pallietier — F. Timmermans	35,— »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz.	18,— »
Verdaj Donkifotoj — J. Baghy.	18,— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)	12,— »
Examenopgaven	10,— »
Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten)	10,— »
Blinda Rozo — H. Conscience	4,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterriek	5,— »
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50 »
Schildlof Zakwoordenboek	25,— bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,— bind
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,— broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Adolf De Keyzer
P. van Humbeekstr., 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj
Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
H. VAN DURME kaj aliaj.

Sciigo de la Estraro

La estraro de Flandra Ligo, sciigas al la delegitoj de la aliĝintaj grupoj kaj la reprezentantoj, ke la sekvonta kunveno de la ligo okazos en Bruselo, la 13an de Decembro, je la 10a. matene, en la ejo de N.E.L.E. « Breughel, Em. Jacquainlaan, 37.

* * *

Nova tarifo por la anoncoj sur la koverto de « Flandra Esperantisto »:

	12 monatoj	6 monatoj
1/1 paĝo	Fr. 200,—	Fr. 125,—
1/2 paĝo	Fr. 125,—	Fr. 75,—
1/4 paĝo	Fr. 75,—	Fr. 50,—
1/8 paĝo	Fr. 50,—	Fr. 30,—

Por pliaj klarigoj oni turnu sin al la administranto : P. Van Humbeekstr., 3, Bruselo.

Poŝtgiro : 2321.50 de Flandra Ligo Esperantista, Bruselo.

LA ESTRARO.

Kunveno de Flandra Ligo Esperantista

La kunveno okazis en Bruselo, ejo « Breughel », la 27an de Septembro 1936.

Estis reprezentataj : la sekcioj Aalst, Antwerpen, Brussel, Kortrijk, Leuven, Mechelen ; ĉeestis la reprezentantoj el Ronse, Gent, Astene. Sin senkulpigis la sekcioj Brugge, Oostende kaj Roeselare.

La sekretario laŭtlegis la raporton de la antaŭa kunveno, kiu estis senrimarke aprobata.

Fino Terryn komunikis la bilancon de la krongeso en Gent, kiu lasis Fr. 436,55 da profitsaldo, de kiu la duono iros al la liga kaso.

N.E.L.E. (Nia Estas La Estorteco)

Flandra Esperantista Grupo

Ejo * Breughel *

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)

Dum la lasta kunveno en Gent, la estraro decidis reorganizi la diversajn servojn de la Ligo ; kelkajn semajnojn poste S.ro Bassleer informis la estraron ke liaj okupoj ne permesas plenumi pluajn taskojn kaj petis akcepti lian eksigon kiel kasiston. Sanoj. Rainson kaj De Keyser kontrolis la librotenadon kaj trovis ĉion en bona ordo, pro kio ili kvitancis kaj dankis en la nomo de la estraro.

S.ano Adolf De Keyser akceptis provizore funkcii kiel kasisto. Lia unua laboro estis la esploro de la membro — kaj abonlistoj kies konkludoj permesas klaran distingon de la ĝenerala situacio. En tiu raporto ni lernas i. a. ke la propagando por nia revuo en la sekcioj estas ĝenerale malkontentiga ; en pluraj grupoj ekzistas granda malproporcio inter la nombro de membroj kaj tiu de la abonantoj ; en Oostende ekzemple, ĝi estas eksternormala, ni trovas tie 32 liganojn kaj nur 8 abonantojn ! Entute la sekcioj liveras nur la trionon de la abonombro, la resto venas de izoluloj.

La bultena kaso enhavas 2.835,35 fr., sed la ankoraŭ aperontaj numeroj antaŭvidigas deficiton de Fr. 4.700,—. Tiu breĉo estas facile ŝtopebla se ĉiuj sekcioj faras sian devon, helpante al varbado de 100 novaj abonantoj.

Por plifaciligi varbadon de anoncoj, nova kaj modera tarifo estas starigita ; ankaŭ tio devas fariĝi fonto de enspezoj.

Same, por la redakcieja skribmaŝino mankas ankoraŭ Fr. 177,50.

Ĉiuj devas plenumi parton de la komuna tasko, ĝi ne superas niajn fortojn kaj la efektivigo devas certigi la financon sanon de nia Ligo.

La prezidanto deklaris ke la nuna kunveno devas elekti la novan kasiston kaj proponis Sanon De Keyser kies raporto atestas ke li scias kian laboron la Ligo atendas de li.

La propono estis aklame aprobata kaj la prezidanto gratulis la novan kasiston.

Punkto 4 de la tagordo : Cseh-kursoj, estis pritraktata de la liga sekretario kiu resumas siajn spertojn kaj impresojn pri la nova kursserio organizita en nia lando, kun helpo de profesia instruisto.

Ĝis nun okazis nur libro-metodaj kursoj, preskaŭ ĉiam publike kaj senpage ; dum la lastaj jaroj la intereso por tiuj kursoj grave malkreskis kun la sekvo ke la movado stagnaciis kaj ke diversaj grupoj malaperis.

Estis facile kulpigi la « krizon » sed dumtempe oni konstatis kreskantan progreson en aliaj landoj kie la ekonomia krizo regis almenaŭ tiom forte ol ĉe ni. Estis landoj kie floris la Cseh-kursoj.

En la komenco de ĉi tiu jaro, la sekretario de FLE organizis rondvojaĝon de la nederlanda Cseh-instruisto Henk Thien. La provlecionoj de S.ano Thien montris ke la nova metodo estas ja tre valora instrumento en la manoj de lerta persono.

La tradicia libro-metodo devas cedi la terenon se oni povas disponi pri kompetenta Cseh-instruisto. Ne signifas senreserva kondamno de la libro-metodo kiu cetere formis plejgrandparte la Esperantistan popolon kaj daŭre faros grandajn servojn, ĉar ankaŭ tiu metodo nombras profesorojn kiuj ĝin majstre uzas.

S.ano Thien estis invitita por gvidi kursserion en Flandrujo. Inter la dato de akcepto kaj de la komenco restis ekzakte 11 tagoj por

serĉi kursejojn kaj fari la tutan propagandon. La elektitaj lokoj estis Deinze, Waregem kaj Kortrijk. S.ano Vanderlinden el Astene prilaboris Deinze ; en Waregem kie ne estis esperantisto, propagandis kelkaj Kortrijk-anoj, disdonante flugfoliojn ĉe la pordo de la preĝejo kaj en la vilaĝo. En la gazetoj de la 3 lokoj kaj en la tag-jurnaloj aperis varbartikoloj, ĝis la lasta minuto estis farata multe da persona propagando.

La provlecionojn ĉeestis : en Deinze proksimume 80 da personoj, en Waregem 40, en Kortrijk 70.

Sin enskribis por la kurso : en Deinze 33, en Waregem 24, en Kortrijk 44 gelernantoj, ciferoj kiuj superis la esperon de la organizantoj. La kotizo estis Fr. 40,—.

Komparinde estas ke por la antaŭa senpaga kurso en Kortrijk sin enskribis 5 gelernantoj ! Jen indiko por la grupoj kiuj timas pri la sukceso de pagotaj lecionoj !

La prezidanto Rainson nun preparas Cseh-kursojn en pluraj lokoj, inter kiuj Aarschot, Tienen, Leuven, Halle, Assche, Arendonk, Herenthals, kun Ĉeko-Slovaka instruisto. Per la Cseh-kursoj ni esperas konkeri la tutan Flandrujon.

La mondo vivas kun febra rapideco ; venante al kurso la publiko volas tuj palpeblajn rezultatojn ; Cseh-kurso plenumas tiun postulon kaj en bonhumora atmosfero instruas en rekordtempo la ĉefajn elementojn de nia lingvo.

La prezidanto klarigis punkton 5 de la tagordo : provinca propagando. Jam en antaŭaj jaroj provo estis farita en tiu senco sed sen granda praktika rezultato. Nun ni disponas pri pli granda reto da izolaj membroj, kiuj per komuna laboro povus agi en siaj respektivaj distriktoj. La sekcioj jam de nun pridiskutu la aferon por ke ĝi ekfunkciu venontan sezonon.

En punkto 6 : la revuo, temis speciale pri plendoj de abonantoj kiuj ne regule ĝin ricevas. Tiu afero estos ekzamenata inter la kasisisto kaj la ekspedisto, kiuj trafos la bezonatajn aranĝojn.

S.ano Lenaers informas pri siaj traktadoj kun S.ro Vanoverstraeten ĉefredaktoro de « Toerisme » por reaperigi E-rubrikon kaj kurson. La rubriko ree povos aperi kaj ek de 1938 loko estos denove disponebla por kurso.

S.ano Vanderlinden demandis ke la Instituto eldonu propagandan broŝuron malkare vedeblan. S.ano Cortvriendt respondis ke tio estas en preparo sed nun ni atendas la vendrezultatojn de la nova ilustrita lernolibro kiu post kelkaj tagoj aperos.

La prezidanto insistis por ke okaze de kursoj, la sekcioj kaj la kursgvidantoj klopodu vendi unuopajn numerojn de F. E. kiuj estas haveblaj po 1 franko por numero. Tiel la lernantoj tuj kontaktas kun la Ligo kaj havas samtempe nemultekostan legaĵon.

La prezidanto esprimis sian bedaŭron ke ne ĉiuj sekcioj senescepte estis reprezentataj, intima kontakto estas nepre bezonata por fruktedona kunlaboro ; malproksimaj grupoj argumentas la vojaĝkoston, tamen, en tiu kazo la Ligo konsentus subvencii la sekciojn kiuj petus helpon.

La venonta kunveno okazos en Bruselo, la 13an de Decembro 1936.

LA SEKRETARIO.

Esperanto in de Praktijk.

BRAZILIE.

Op het kongres der Braziliaansche akademie voor belletrie, onlangs te Rio-de-Janeiro gehouden en waar afgevaardigden der 20 Braziliaansche staten aanwezig waren, werd volgende motie eenparig goedgekeurd: « Het kongres, het groote voordeel voortspruitend uit het internationaal bekend maken der nationale meesterwerken in overweging nemend, drukt den wensch uit de regering het vertalen dezer werken in de belangrijkste talen alsmede in de internationale taal Esperanto te zien aanmoedigen ».

De stedelijke bibliotheek van Rio-de-Janeiro besloot een speciale afdeling voor Esperanto-werken op te richten.

ESTONIE.

Het maandblad voor toerisme « Turismi Teataja » publiceert regelmatig een bladzijde in Esperanto waarin de toeristische bezienswaardigheden van Estonië worden besproken.

FRANKRIJK.

De Staatszender te Lyon stelt een gedeelte van den Zaterdagchen zendtijd ter beschikking eener Esperanto kroniek. Een maal per maand worden door Radio-Normandië mededeelingen in het Esperanto uitgezonden.

Door de universitaire Esperanto-vereeniging van Lyon werd een vragenlijst tot al de parlamentsleden gericht nopens het eventueele invoeren van Esperanto in het onderwijs.

Het blad « Le Progrès de la Somme » begon de publicatie eener Esperanto-rubriek; « Le Journal d'Amiens » vermeldt dagelijks de Esperanto-uitzendingen.

GRIEKENLAND.

In de gendarmerieschool van Athene volgen 120 kandidaat-officieren een Esperanto-kursus.

ITALIE.

In het officieel verslag over den wedstrijd uitgeschreven door het ministerie voor propaganda, lezen wij dat Esperanto de tweede plaats veroverde voor wat het aantal deelnemers betreft en den vierden prijs behaalde voor wat de waarde van het ingezonden werk aangaat.

NEDERLAND.

Het hooger gerechtshof te Haarlem benoemde den heer G. Teders als beëdigd vertaler voor de Esperanto taal. Dit is de derde dergelijke benoeming in Nederland.

Het blad « Ons Weimarkwartier » uitgegeven in Den Haag met een oplage van 16.000 ekz. heeft een Esperanto-rubriek ingevoerd. In het « Dagblad van Rotterdam », « Dagblad van Gouda », « Dordrechtsche Courant » en « De Vijf Rivieren » verschijnt Donderdags een « Esperanto-Rubriko ».

OOSTENRIJK.

Het bestuur der Oostenrijksche postvereeniging gaf een reeks officieele prentkaarten in het licht. De toelichting is, op vermelde kaarten, ook in het Esperanto gesteld.

POLEN.

Te Warchau verscheen « Ĉielarka Standardo », internationaal kooperatief orgaan, uitgave ten dienste der kooperaties, geheel in Esperanto. Gratis proefnummers van dit knap opgesteld en uiterst verzorgd blad kan ieder aanvragen bij Eldona Kooperativo « Spolnota Pracy » Str. W. Gorskiego, 6, Varsovio, Polio.

PORTUGAL.

In twee te Porto verschijnende weekbladen werd met het publiceeren van een Esperanto-leergang aangevangen.

VEREENIGDE-STATEN.

In 't Parlement wordt een cursus gehouden waaraan 70 parlamentsleden en ambtenaren deelnemen.

Joseph R. Scherer, Esperanto-propagandist, vervulde 700 spreekbeurten waaronder verschillende in universitaire middens.

Is de idee van de wereldhulptaal vatbaar voor verwezenlijking?

Heeft de wereld een internationale hulptaal nodig?

Dat deze twee vragen bevestigend dienen beantwoord, moge blijken uit de hieronder aangehaalde verklaringen van enkele der grootste verstandens van deze eeuw en van vroegere tijden, betreffende de mogelijkheid, het nut en de noodzakelijkheid eener internationale taal.

Reeds in de 17e eeuw waren groote denkers als Descartes en Leibnitz er van overtuigd dat een kunstmatige taal kon geschapen worden, die de begrippen zoo nauwkeurig uitdrukt als gelijk welke natuurlijke taal, maar die daarenboven door de eenvoudigheid en regelmatigheid harer grammatikale structuur veel gemakkelijker zou zijn om aan te leeren.

Max Müller, een der beroemdste taalkundigen der 19e eeuw, was dezelfde overtuiging toegedaan. Hij schreef inderdaad :

« De idee van de internationale taal, welke onafhankelijk van de natuurlijke talen, de rol zou spelen van internationaal orgaan, kan ongetwijfeld verwezenlijkt worden. Ik beweer dat die taal, regelmatig, volmaakter en gemakkelijker om aanleeren zou zijn dan gelijk welke natuurlijke taal der wereld. »

Ernest Navil, de alomgekende Geneefsche filozooft, in een verslag aan de Fransche Akademie voor Moreele en Politieke Wetenschappen, schreef over de internationale taal het volgende:

« Het invoeren eener Internationale Wereldtaal is een van de grootste en dringendste noodwendigheden van de huidige beschaving. Het is noodig dat de bewoners over de gansche wereld een middel bezitten, dat hen toelaat onderling hun gedachten en gevoelens mede te deelen en aldus een ondoelmatigen overlast van talenkennis, welke de normale ontplooiing van het verstand en de zelfstandigheid in het denken dreigt te compromiteeren, uit te schakelen.

» Welk een edel doel zulk middel te zoeken, zelfs spijs lange en moeizame pogingen ! Wat een weldaad voor de menschheid, indien zij met sukses worden bekroond ! Dan zullen de geschiedschrijvers der 20e eeuw een van de grootste en belangrijkste data van de wereldgeschiedenis mogen boeken. »

Ziehier het oordeel van den filozooft Nietzsche (de auteur van *Zarathutstra*) :

« De noodwendigheid vele talen aan te leeren, is een onhebbelijke kwaal. Hun menigvuldigheid zal echter de menschheid aanzetten een middel te vinden om die moeilijkheid te overwinnen, en in een nabije toekomst zal zij een nieuwe taal bezitten : eerst voor den handel, later voor de geestelijke betrekkingen in het algemeen. »

Tolstoï, in een zijner brieven, schreef het volgende :

« Dat alle menschen van de verschillende natiën voor hun onderlinge betrekkingen, éézelfde gemakkelijke taal gebruiken ! Ik meen dat dit een rationeele oplossing is, die spoedig en algeheel kan verwezenlijkt worden. »

Men zou nog meer gelijkaardige verklaringen kunnen aanhalen en een gansche rij klinkende namen van hedendaagsche beroemd-

heden uit de wetenschappelijke en litteraire wereld kunnen opnoemen (Littré, Renan, Prud'hom, Reclus, en zooveel andere), beperken wij ons echter bij het aanhalen van de krachtige en gezagvolle woorden van Dr Ostwald, professor in Natuur- en Scheikunde bij de Universiteit van Leipzig, van wien wij een kostbare studie bezitten over de Internationale Taal :

« Voor mij bestaat niet de minste twijfel dat voor het wetenschappelijk en filozofisch werk, de rationeele kunstmatige taal de natuurlijke taal overtreft, zooals de automobielen den voetganger. »

Dat de idee van de Wereldhulptaal kan verwezenlijkt worden, bewijst ESPERANTO.

A. ACKAERT — Brussel.

(Volgens het werkje van Dr Sirvanof : *Ĉu estas ebla kaj necesa internacia helplingvo*).

La Sorĉdancejo

(EN AARTRIJKE)

Jen, herbejo, mirinde malgranda — nur duono de aro — limigata je tri flankoj per mallarĝaj vojetoj. Vojeto kondukas al najbara arbaro, alia al kotega kamparvojo, la tria al kaduka dometo. Neniu kamparano dumnokte preterpasus sentime tiun lokon. Kial? Bonvolema maljunulino rakontis al mi la jenan legendon :

« Antaŭ kelkaj jaroj, ĉiunokte, la sorĉistinoj dancis sur tiu herbejo. Dum malhelaj noktoj oni povis vidi la blankajn ŝvebantajn littukoj. Littuko ja estas sorĉistina festvesto. Sed alproksimiĝante, oni nur renkontis nigrajn katojn kun fajroradiantaj okuloj. Laŭvole kaj laŭbezone, sorĉistinoj ŝanĝas en nigrajn katojn.

Iufoje, ĝibulo alvenis por ĝojigi la dancantinojn. Denaske, ĝibulo estas humoristo kaj ankaŭ tiu-ĉi ludis la fluton tiel fervore kaj bonege, dumpaŭze li ŝercis kaj ridigis tiel spontane ke la ravitaj sorĉistinoj interkonsentis, rekompenci la intereseĝan bonvolemulon.

Mateniĝis. Antaŭ disiĝi, el dankemo, sorĉulino forprenis la ĝibon de la flutisto.

La sekvontan tagon : mirego inter la vilaĝanoj. Sed la estinta ĝibulo silentis pri la mirakla malapero de sia dorskesto. Nur al kolego en la malfeliĉo, li rakontis la noktan historion.

Komprenoble jam la saman vesperon, eĉ antaŭ la plena subiro de la suno, la dua ĝibulo troviĝis — sur la fiksita loko. Sed — la ekceptoj certigas la regulon — tiu lasta ĝibulo laŭ karaktero estis tute malsimila al la unua. Kun timeme, batanta koro, li atendis la alvenon de la noktaj gastinoj. Anstataŭ ridigi la ĉeestantojn, li nur faris kompatindajn stultaĵojn. Lia klarineto ekresonigis falsajn kaj malritmajn notojn. La sorĉistinoj ne komencis la danson, sed rigardis unu la alian. Kian punon tiu impertinentulo meritas?

Mateniĝis. Sorĉistino alproksimiĝas de la ĝibulo. Anstataŭ forpreni ion, ŝi metas ion sur lia brusto. Estis la ĝibo de la gaja ĝibulo. La bedaŭrinda, malfeliĉa flutisto hejmeniris kun du kestetoj, unu dorsflanke, alia brustflanke.

Achiel DE GROOTE — Aartrijke.

Ĉu vi sciis...?

Kara leganto, ĉu vi jam sciis ke en Japanujo niaj flandraj aŭtoroj estas legataj? Ni legis en « Revuo Orienta » de la monato Septembro eldonata de la Japana Esperanto-Instituto, Tokio, ke « La Leono de Flandrujo » de Conscience, estas tie aĉetebla. En la numero de Oktobro ni vidis « Palliefer », de Felix Timmermans (tradukila de nia samideano Jan Van Schoor), menciita en la listo de la tie venditaĵoj.

Tiu-ĉi novaĵo certe ĝojigos ĉiun flandran Esperantiston!

Sciigoj de la Lingva Komitato (Akademio)

1. — Kun granda bedaŭro ni sciigas pri la morto de *Dr Corret*, Akademiano, kaj de *S-ro Oskar Van Schoor*, L. K-ano.

Eksigis el la Akademio, *Prof. Aymonier*, *Dr Bennemann*, *Prof. Migliorini*; kaj el la L. K. *Ing. Orenge*, *S-roj Döhler* kaj *Christaller*.

2. — La L. K-anoj estas petitaj voĉdoni pri *ŝanĝo en la Regularo*, koncerne la konsiston kaj elekton de la L. K.

Respondis 53 membroj el 116.

52 aprobis la proponon, ke la nombro de la L. K-anoj ne devos superi 100, kaj ke tiu nombro estu atingata antaŭ 1940, per neplenumado nur de la postenoj vakantaj pro morto aŭ eksigo. 45 aprobis la proponon, ke estu intertempo de unu jarduono inter la prezentado kaj la baloto de novaj membroj. Pri la propono forstreki el la Regularo la tekston rilatan al la lingva konsisto de la L. K., 18 aprobis, 31 ne aprobis, 4 ne decidis. Pro tiu rezultato tiu teksto ne estos forjetita.

La Jarlibro de 1936 estas redaktita laŭ tiuj decidoj, escepte la artikolon 9 de la Statutaro, kiu estos reĝustigata kiam la nombro 100 estos atingita.

Pro la decido pri deviga duonjara intertempo, la ĝisnunaj metodoj de elekto devas esti ŝanĝataj. La prezentado okazos la 1-an de Julio kaj la baloto okazos komence de la sekvanta jaro.

Sekve, por la elektoj de 1937, la kandidatoj estas prezentitaj la 1-an de Julio 1936.

3. — Pro bedaŭrinda eraro en la programo, la *Kunsido de la Lingva Komitato* ne okazis dum la Kongreso de Wien. (Estis anoncita Kunsido de la Akademio anstataŭ Kunsido de la L. K.).

La Prezidanto:

M. ROLLET de l'ISLE.

Pri la Olimpiado en 1940

La Japana Esperanto-Instituto en Tokio, aŭdigas sian voĉon rilate al la Olimpiado kiu okazos en 1940, en sekvantaj terminoj:

« Ni urĝe petas helpon de l'Eŭropaj samideanoj, kio certe faros gravan servon por nia movado.

Tre baldaŭ oni konsiliĝos en Berlino por decidi la lokon, kie okazos la 12a Olimpiado, 1940. Kaj ĝin volas inviti Helsinki, Romo kaj

Tokio. Krome oni informas, ke ankaŭ Londono prezentas sin kiel kandidato.

Kiun lokon oni elektos, tio ŝajnas tute senrilata al nia afero. Sed ni atentigas, ke la invito de Tokio havas specialan signifon, kio certe interesas ankaŭ la esperantistoj.

Jam ne bezonus menci, ke Olimpiado estas unu el la plej evidentaj internaciaj aferoj, por nia movado. Sed ni devas ĉi-tie tion akcenti, ĉar ĝi nun staras ĉe la grava momento. Al ni, Japanoj, ŝajnas, ke nemalmultaj Eŭropaj landoj miskomprenas, kvazaŭ Olimpiado, estas nur Eŭrop-Amerika afero.

Laŭ la raportoj de Tokiaj journaloj, en Eŭropaj landoj oni flustras, ke Tokio estas tre malproksima, kaj sekve... Per tiu motivo aŭ preteksto oni intencas ne akcepti la inviton de Tokio.

Jes, vere Tokio estas malproksima de Eŭropo. Sed pripensu : tio signifas ke Eŭrope estas malproksima de Tokio. Sed malgraŭ tio Tokio-Japanujo sendis jam 11 fojojn siajn sportistojn al tiuj malproksimaj Eŭropaj kaj Usonaj urboj ! Ankaŭ en la nuna jaro ĝi sendis korpuson da junuloj. Por tio la Japana parlamento aprobis subvencion de ne malgrava sumo.

Unu Japanujo iras 11-foje al Eŭropo aŭ Usono. Kaj la Eŭropaj landoj ne povas — aŭ ne volas sendi al Tokio eĉ unu fojon ! Kion tio signifas ?

Tokio havas specialan aspiron inviti la 12an, ĉar en 1940 Japanujo festos grandan jubileon — la 2600a jaro de la fonda de la imperio. Se oni perdos la ŝancon, la Japanoj devas atendi ankoraŭ jarcenton. »

Pli ol 7000 studentoj vizitis la Izermonumenton

« Het Nieuwsblad » publikigis sekvantan artikolon :

Dum ses semajnoj (Junio-Julio 1936a), sep mil dudekunu (7021) studentoj el cent dek ses (116) diversaj lernejoj (interalie el Anglujo, Germanujo kaj Nederlando vizitis la Monumenton.

El pli ol cent flandraj vilaĝoj kaj vilaĝetoj ili venis grupe al la Kruco.

Mirinda kaj pia ago de la lernejestroj, kondukante siajn lernantojn tien, kie ĉio plenbuŝe parolas kaj rememoras pri la ofero kaj sufero, kiujn la Izersoldatoj tiel pacienceme plenumis ĝis la morto, por ke iliaj infanoj kaj samtempe ĉiuj infanoj de ilia popolo iam estu liberaj kaj dum ĉiama paco kresku.

Pli ol sep mil infanaj okulparoj fiksrigardis la Krucon de Flandrujo, sub kies gardado ripozas en eterna dormado iliaj « pli aĝaj fratoj », reprezentante la tutan mortigitan soldataron. Iliaj rigardoj ŝvebis trans la verdigantaj kampojn, kie antaŭ kelkaj jaroj iliaj fratoj falis, trafitaj per la terura militvergo.

Ke ili gardis profundan impreson pri la Monumento estas fakto, malgraŭ, ĝis nun, ili rilate ne ĉion komprenas.

Ofte ni estas vidintaj dekojn da infanoj, preĝantaj kun falditaj manetoj por ĉiu el siaj heroaj fratoj en la Izerebenajo dise kuŝantaj kaj per kompato trafite ni pasis, tiujn rememorante kiuj iam staris en la tranĉeoj de la morto. Kaj pensante al la hodiaŭa junularo kaj al la promesoj de la gvidintoj, kiuj nin certigis ke ni tiam batalis

por ekstermi la militon, ke ni luktis kontraŭ la militarismo kaj kontraŭ la milito mem.

Ĉu ia restaĵo de tiu promeso ankoraŭ estas videbla ?

Ĉu al la hodiaŭa junularo, en la kunfalditajn infanmanetojn morgaŭ ne estos impertinente puŝata pafilo, denove per tiu sama mensogo, kiu nin persistigis : « Por la lasta de la militoj ».

Kaj pro tio estas bone ke ili venu al la Monumento, por ke ili presu en siajn junajn kapetojn la proverbon ĉizilitan je ĉiu flanko de la Turo : « NENIAM PLU MILITO », por ke ili fariĝu pacapostoloj je la servo de Flandrujo kaj ĝia popolo !

Tradukis Marcel TERMOTE Roeselare.

Lapona vivo modernigita sed lingvo, moroj kaj tradicioj vivas

STOCKHOLM (Sved-Internacia Gazetservo)

La nomada vivo de la laponoj en norda Svedujo modernigis, sed iliaj moroj, tradicioj kaj lingvo pluvivas, diras lastatempa raporto aperinta en Stokholmo. La malnovtempa maniero veturi en « akja », boatsimila sledo tirata de boaco, malaperas, precipe en distriktoj, kie troviĝas aŭtobusaj linioj. La laponoj tamen ankoraŭ kondukas siajn boacojn de unu poŝtejo al alia, sed nuntempe en grandaj kolektivaj gregoj, dum antaŭe ĉiu familio kondukis sian propran gregon aparte. Nuntempe troviĝas en Svedujo ĉirkaŭ 8.000 laponoj, el kiuj ĉirkaŭ unu triono vivas per boacbredado, dum la resto komencis okupi sin pri terkulturo kaj aliaj entreprenoj. La lernejoj, ne malplej la migrantaj t. n. nomadaj lernejoj, kaj la pliboniĝintaj komunikoj kaŭzis grandan ŝanĝon en la malnova kaj origina lapona kulturo, sed la lapona lingvo estas ankoraŭ parolata en la hejmoj kaj en la boacaj arbaroj, kaj la laponoj havas propran gazeton, kiu multe instigas siajn legantojn skribi en lapona lingvo siajn spertojn, tradiciojn kaj rakontojn. En la malproksimaj nordaj sovaĝejoj la laponoj grandparte ankoraŭ vivas la tradician kaj romantikan nomadvivon de siaj prapatroj. La laponoj en la distrikto Sorsele ĉiujare kondukas siajn gregojn inter paŝtejoj kun entuta distanco de ĉirkaŭ 400 km.

Por konservi kiel eble plej multe de la lapona kulturo la Nordlanda Muzeo en Stokholmo nun kolektas malnovajn laponajn ilojn kaj objektojn por siaj kolektoj.

Diversaĵoj

En la raporto pri la Universala Kongreso en Vieno, represita en « Esperanto Triumfonta », la nova gazeto eldonita en Nederlando por anstataŭa la en Germanujo malpermesita « Heroldo(n) de Esperanto », troviĝas sekvanta rimarko : « Eble estus estinte avantaĝo » se pli multe da vienanoj estus kunhelpintaj en la kongreso kiel » gvindantoj kaj tradukistoj, ĉar ekzistas ĉiuokaze sufiĉe da esperantistoj en Vieno. Tion ni povis konstati en la urbo kie ni ofte » renkontis unuopajn vienajn esperantistojn, kiuj neniel estis en kontakto kun la kongreso. La kaŭzo de tio verŝajne estas la fakto,

- » ke en Aŭstrio ekzistas du societoj : la oficioza Aŭstria Esperantista
- » Asocio kaj la novefondita Aŭstria Esperantista Federacio, kiu
- » tamen havas pli multajn membrojn ol la antaŭa kaj eĉ posedas propran organon : La Verda Revuo. Cetere pri AEF oni ne aŭdis unu
- » vorton dum la kongreso. »

* * *

La Esperanta Oficejo Gazetara, post mallonga tempo komencos aperigadi konstantan esperantlingvan bultenon gazetaran por la esperantaj gazetoj de la tuta mondo. Redakcioj kaj ĵurnalistoj, kiuj deziras ricevi la bultenon, estas petataj ĝin ekpostuli.

La *Bulteno estos sendata tute senpage.*

La Esperanta Oficejo Gazetara sin turnas al ĉiuj esperantaj gazetoj, ĵurnalistoj kaj aliaj volontuloj pri alsendo de esperantaj gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj pri la esperanta movado.

La Esperanta Oficejo Gazetara liveras senpage materialon pri Polujo kaj pri la esperanta movado en Polujo.

Adreso : Antoni Pisarski-Woydakowski, Direktoro de la Esperanta Oficejo Gazetara, Warszawa 1., poŝtkesto 408, Pollando.

POR NIA REVUO :

Jet Fr, 10,—

* * *

SOLVITA PROBLEMO

Pri kio ne kuraĝis songi la unuaj pioniroj de Esperanto, fariĝis nun realaĵo. Pli kaj pli laŭtigas la voĉoj en diversaj landoj : « Esperanto en la lernejon ». La esperantistaro komencas kuraĝe sieĝi la fermitajn pordojn de la lernejoj, por doni al sia posteularo unu komprenilon por internaciaj rilatoj, indan je nia moderna epoko, kaj forigi de ĝia ŝultro la malbenitan ŝarĝon, kiun alportas lernado de multaj lingvoj.

En kelkaj landoj oni jam pridebatis la eblon eldoni lernolibreton por infanoj kaj verki porinfanan literaturon. Fronte de tiuj-ĉi klopodoj staris la Federacio de lab. esp. en la regiono de la nederlanda lingvo, kiu pasintjare kunigis en siaj kursoj pli ol 500 infanojn kaj laŭ la perspektivo en la nuna sezono ĝi atingos verŝajne duoblan nombron da junaj adeptoj por Esperanto. La Federacio, metita jam nunjare antaŭ tuja solvo de la problemo, klopodis trovi la plej praktikan vojon kaj atentinte ĉe tio ne nur nederlandan, sed ĉiulandan bezonon je tiu ĉi kampo, ĝi prezentas al la esperantistaro lernolibron por infanoj, verkitan de instruistino A. Rebers kaj ankaŭ internacie uzeblan. La unua volumo de tiu-ĉi ilustrita lernolibro enhavas 40 lecionojn kaj aperos je la 1-a de Septembro en la presita infan-gazeto « La Vojo », ĉiumonate kun 4 lecionoj.

Al eksterlandaj instruantoj la Federacio disponigas *senpage* esperantan gvidilon kaj esp. tradukon de la nederlandlingvaj ekzercoj, por ke oni povu traduki ilin en sian gepatran lingvon.

La infangazeto « La Vojo » havas por la instruantoj duoblan valoron, ĉar krom la lecionoj ĝi prezentas internacian legajon por komencantoj kaj progresantoj.

Abonprezo por tuta jaro (12 n-roj. po 8 pĝ) kostas nur fl. 0.65 aŭ 5 internaciaj respondkuponoj. Por 1 n-ro, oni sendu 1 respondkupanon.

Adreso por abono (kun antaŭpago) : Postbus W. 6, Amsterdam-West, Nederlando.

* * *

En la Oktobra numero de « Franca Esperantisto », aŭb titolo : La Laborakunsidoj de la Komitato de UEA en Vien », ni legis jenan paragrafon:

La Komitato komisiis S.ron Kempeneers por akceli interkonsenton de la Flandra Esperanto Ligo kun la Belga Ligo.

* * *

Pro malagrablaj okazintaĵoj okaze de la decido translokiĝi la oficejon de UEA al Londono, la Komitato decidis ekŝiĝi el UEA kaj fendi novan asocion sidantan en Londono, sub titolo « Internacia Esperanto-Ligo ».

« Heroldo de Esperanto » ree eliros kaj estos oficiala organo de IEL, same kiel la Monata Heroldo nun nomita « Esperanto Internacia ». La redaktoro, S.ro Jung, nun restas en Hago.

* * *

Esperanto en Kimrujo

Ĝis nun Esperanto ne bone progresis en Kimrujo. Por propagandi la lingvon kaj la movadon en la lando kelkaj fervoraj samideanoj instigis la komitaton de la « National Eisteddfod of Wales » — tre grava literatura kaj muzika festo — enhavigi en la programon por la venonta jaro (1937) Esperantan konkurson.

Do, por la plej inda traktato pri « Esperanto kiel komprenigilo inter la nacioj » oni donos premion de £ 5 (100 ŝilingoj).

Samideanoj el la diversaj landoj ! Montru ke Esperanto estas utila kaj necesa. Verku traktaton kaj sendu ĝin ĝustatempe. Notu bone la regulojn. La numero de la konkurso estas 30.

Temo : « Esperanto kiel komprenigilo inter la nacioj ».

Ciu verkaĵo devas esti manskribita, maŝinskribita aŭ presita sur unu flanko de la papero. Uzu paperon sufiĉe grandan (ĉirkaŭ 30 c.m. × 20 c.m.) kaj kunligu la foliojn. Ciu verkaĵo afrankita kaj registrita, devas esti ĉe la sekretario inter Aprilo 22-a kaj Majo 1-a 1937.

Ciu konkursanto devas subskribi sian verkaĵon per pseŭdonimo, kaj sendi sian nomon kaj adreson en sigelita koverto sur kiu montriĝas la nomo kaj numero de la konkurso, nome, 'Esperanta Traktato. No 30.' kune kun la pseŭdonimo de la konkursanto.

Nomo kaj adreso de la sekretario :

Sinjoro J. Rhys Lewis, Eisteddfod Office, Machynlleth. Mont., Wales (Granda Britujo).

Gratulo

Niaj simpatiaj gemembroj Gesinj. Ed. Boyens-Mossel estas la plej feliĉaj membroj de la Flandrema Grupo : fileto Viktor naskiĝis la 2-an de Oktobro. Patrino kaj ido bonfartas. La Ligo, la Redakcio kaj speciale la Flandrema, prezentas al la junaj gepatroj siajn plej sincerajn gratulojn.

Nekrologo :

En Liero mortis la 8-an de Oktobro nia Liera pioniro S.ro Leflot. Li estis bone konata en la Esperantistaj medioj kaj de ĉiu respektata, ĉar li estis bonkora, simpatia kaj fervora Esperantisto de antaŭ multaj jaroj.

Li estis ne plu juna, kiam la problemo de universala lingvo komencis interesi lin kaj kun granda kuraĝo li lernis Volapük. Sed, konstatinte la nelogikecon kaj la malsimplecon de tiu-ĉi lingvo, li studis Esperanton kaj iĝis unu el la plej bonaj adeptoj de nia Zamenhofa lingvo. Precipe la Lieranoj perdas en li sian patron, ĉar ili scias kion li faris, dum tiom da jaroj kaj malgraŭ ĉiuspecaj malfacilaĵoj, por vivteni la de li starigitan grupon « Liera Stelo ».

La kruela sorto ne indulgas ! Lia kuraĝo kaj senlaceco estu por ni, junuloj, ekzemplo kaj instigilo al plua laboro ! Li ripozu en paco !

Al la funebranta familio, la estraro de Flandra Ligo kaj la Redakcio de Flandra Esperantisto, en la nomo de ĉiuj siaj gemembroj, prezentas siajn plej sincerajn kondolencojn.

Bibliografio

(Duope ricevatajn verkojn ni recenzas, unuope ricevatajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

PROGRESADO KAJ LA PASINTECO, verkita de G. F. Wates, aŭtoro de « La Magio de komuna prudento », el la angla lingvo tradukita en Esperanton de William Bailey. Eldonita de « The Esperanto Publishing Co. Ltd. », High Holborn, London, W. C. I, Anglujo. Prezo : 3 ŝ. 6 p. ; afranko : 4 p.

Ni ĉiuj konas pli malpli la historion, sed... kiel apartajn, memstarajn faktojn, kaj ni ordinare ne vidas la rilatojn de iu fakto al alia. Estas kvazaŭ ĉeneroj nekunigitaj, sed la ĉenon ni ne trovas.

Legante la libron de Wates, la historio sin prezentas al nia menso kaj imago, kiel vera filmo malrapidigita, en kiu ĉiu bildo estas ligita al la sekvanta. Ne plu estas la ĉeneroj, kiuj montras sin al ni, sed la kompleta ĉeno de la fruhistorio ĝis en la nuntempo. Koncize kaj vere senpartie, la aŭtoro metas antaŭ niajn okulojn, kelkajn el la grandaj epokoj de la monda historio, kaj li lasas ilin fari sian impreson. Tion oni nur malofte renkontas en aliaj historiaj verkoj, kiuj kelkfoje havas grandan reputacion, sed en kiuj oni vane serĉas la necesajn ligilojn por kompreni la tutajn de la mondhistorio. S.ro Wates, tiurilate, plenumis la mankon kaj ni devas gratuli lin

pro lia sukcesplena laboro. Ne ĉiujare aperas tia verko ! Ni estas konvinkitaj, ke ĉiu, kiu legos la libron, multe profitos de ĝia legado, ĉar ĝi estas agrable kaj klare skribita. La skizoj pri sociaj kaj religiaj faktoj, kiujn li donas, estas vere pli ol interesaj kaj ni nur bebaŭras, ke ne sufiĉe da personoj povos legi la verkon.

Pri la traduko de S.ro Bailey, ni nur povas diri, ke ĝi estas perfekta Zamenhofa lingvo : komprenebla kaj klara. Lia stilo estas agrable por legi kaj ripoziga por la spirito. Malmultaj estas la tradukistoj, kiuj, kiel S.ro Bailey, povas fieri pro tio !

Nia recenzo ne estus kompleta, se ni ne gratulus la eldoniston, ĉar la libro estas bone prizorgita kaj ĝi havas belan aspekton.

Entŭte, ni rekomendas kun granda plezuro la verkon al ĉiu, kiu ŝatas interesajn librojn, kaj kiu samtempe deziras akiri ĝeneralan kaj grandampleksan perspektivon de la etika progresado de la homa vivbatalo.

C. SCHROEYERS.

OSLO DENNE UKE. (Oslo de tiu-ĉi semajno) Nr 40, eldonita de Reisetrafikkforeningen, Egertorvet, Oslo, Norveglando, estas sendata al ĉiu, kiu demandas ĝin.

Estas 16 paĝa broŝuro pri Oslo kaj ĉirkaŭaĵo. Bele eldonita kaj riĉe ornamita per belaj fotoj.

Ni ĝin speciale mencias, ĉar ĝi enhavas tri interesajn artikolojn en Esperanto. Tiuj-ĉi artikoloj estas la objekto de konkurso, kiu konsistas en la traduko en nacian lingvon kaj en la aperigado de tiuj-ĉi tradukoj en kiel eble multaj gazetoj, revuoj, jurnalaj, kaj periodaĵoj ĉiuspecaj.

Ĉiu esperantisto, kiu deziras gajni valorplenan premion, (luksaj eldonoj de libroj pri Oslo kaj la lando), demandu tuj la broŝuron, enhavantan la regularon de la konkurso, kiu daŭros ĝis 31a de Januaro 1937.

C. SCHROEYERS.

LA URBA INFORMOFICEJO de la urbo Gent, okaze de la 7a Flandra Kongreso, eldonis belan multkoloran planon de Gent en Esperanto, je la skalo de 1/7500. Ĝi estas tiel klara, ke kun fermitaj okuloj oni preskaŭ povas trovi sian vojon tra la urbo. La alia flanko de la plano donas la priskribon de la urbo kaj de la vizitindaĵoj, sub formo de Promenado tra la urbo. Tiu-ĉi priskribo estas ornamita par kelkaj fotografiaĵoj de la urbo.

Ni gratulas la Informoficejon de Gent pro ĝia iniciativo kaj pro ĝia simpatio por nia lingvo. Sed, ni ŝuldas plej grandan dankon al Fraŭlino Terryn, kiu sukcesis per siaj klopodoj konvinki la urbestaron, pri la neceseco de tiu-ĉi eldono. Interesatoj kaj vizitantoj de la urbo Gent ne forgesu demandi tiun-ĉi belegan esperantlingvan planon al la « Urba Informoficejo » — Halle-Belfort, Gent. Oni ricevos ĝin senpage.

C. SCHROEYERS.

Leo Belmont — **JAK NAUCZYĆ SIE ESPERANTA?** Kiel lerni Esperanton? Formato 15×21 cm. 20 pĝ. Prezo: zl. 0.30 Eldonejo «Lingvo Internacia» en Varsovio. La broŝuro enhavas gramatikan analizon de laboristaj kantoj: Varŝavianka kaj parton de Ruĝa standardo prezentante krome modelon de nemonikaj ekzercoj. Ĝi ne estas ia lernolibro sed povas servi nur kiel gvidilo por memlernantoj kaj progresantaj kursoj.

La *Esperanta Klubo Ljubljana*», por la IXa esperanta kongreso okaze de prezento de «*Servisto Jernej kaj lia Rajto*» eldonis tiun verkon en la libroformo.

«*Servisto Jernej kaj lia Rajto*» estas grandioza kanto de la laboro. Ĝi estas moderna dramo kun ĥoro kaj lumbildoj. La verkon dramatisigis laŭ la originala rakonto de Joh. Cankar S.ro Ferdo Delak. En Esperanton tradukis ĝin majstre konata pioniro S.ano profesoro Modriĵan Franjo. Sciuj, ke la verko estas tradukita kaj jam prezentita en germana, franca kaj serbokroata lingvoj, oni preparas la eldonon en pluaj aliaj lingvoj.

«*Servisto Jernej kaj lia Rajto*» kostas nur Din. 8,— Poŝtelspezoj Din —.50. Por eksterlando ĝi kostas 3 respondkuponoj hun afranko. Oni mendu kaj pagu la sumon ĉe: «*Esperanta Klubo, Ljubljana*», Delaĉska zbornica, Jugoslavio. Ĉe la mendo oni samtempe forsendu la monon ĉar oni ekspedos la libron nur antaŭpage.

ESPERANTA KLUBO LJUBLJANA.

La fremdultrafika sekcio de Ljubljana komunumo ĵus eldonis novan prospekton esperantlingvan pri la urbo. Estas jam la tria tiurilata oficiala eldonaĵo. Ĉe la prospekto kunlaboris la anoj de la Esperanto klubo, kiuj tradukis ĝin.

Tiu nova prospekto ne estos dissendota laŭ la ĝisnuna maniero, pere de nia klubo, sed oni ricevos ĝin rekte de la eldonisto mem.

Gesamideanoj, montru, ke Vin interesas tiu oficiala rekono de Esperanto. Skribu karton aŭ leteron kaj petu la plej novan prospekton de Ljubljana.

Adresu la korespondaĵojn al:

Tujskoprometni svet mesta Ljubljane, LJUBLJANA. Auerspergova palaca. Jugoslavio.

Grupa Vivo

ANTWERPEN — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Dum la ĉiusemajnaj kunvenoj, la grupanoj diskutis vigle pri diversaj temoj. La unuaj aranĝoj estas faritaj por la kristnaska festo. Ankaŭ propono pri transformado de la grupo en societo sen profita celo estas preparolita. Ni ankoraŭ bezonas kelkajn kunvenojn par aranĝi ĉion. La diskutado almenaŭ pruvis ke la grupo vivas, kaj ke la geanoj tre ŝatas preparoli aferojn, pri kiuj ĉiuj povas montri sian opinion. Dum vintro proksima certe denove okazos niaj kutimaj festetoj. Ni kune laboros por ke ili estu kiel eble plej interesaj laŭ propaganda vidpunkto.

Atentu ! La 18an de Novembro, je la 9a vespere, S.ro Lodema, nia eks-redaktoro, faros paroladon en nia ordinara ejo « Nieuwe Carnot », pri sekvanta temo : « La pilotado sur la Skeldo ».

Ni atendas ĉiujn membrojn, kun multaj konatuloj, por tiu-ĉi interesa vespero.

BRUSSEL — N. E. L. E.

Ekde Septembro ni denove regule kunvenis ĉiun Jaŭdon. Kiel pasintjare ni zorgas por interesaj klubvesperoj en kiuj studo kaj distro alternas. La 8-an de Oktobro nia sekretario faris interesan prelegon, en Nederlanda lingvo, pri la historia de la mondlingvo. Plurajn punktojn ni pristudas por nia vintra agado. Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis, de la provincestraro, nian kutiman subvencion.

RONSE — LA PACA STELO.

En la estonta numero ni raportos pri la rezultato de la kursoj komencintaj la 16n de Oktobro.

Jam kelkaj membroj aliĝis al nia kongreso kaj ĉiumonate ni provas por ĉiam daŭrigi la liston.

Nia ŝparkaso bone funkcias.

La biblioteko disdonas je kontentiga maniero, legindajn librojn.

En la proksima numero, ni pli detale raportos pri kelkaj okazintaĵoj.

La angulo de la serĉemuloj

ATENTU ! Problemo 12. Prezeraroj : a) La difino de linio 12 vertikale estas : objekta — adjektiva pronomo de kvalito.

b) 13 horiz. devas esti : presi anstataŭ pesi.

Por doni al ĉiuj la necesan tempon solvi problemon 12, ĝi nur estu ensendata kune kun problemo 13, antaŭ la 5a de Decembro.

Solvo de Problemo 10 : Judaismo — universitato — ultimato — lanterno — krestomatio — administranto — rapsodio — nomado — akademio — sultano. Juul Karnas.

Solvo de Problemo 11 : 3 katoj.

Premioj. Por problemo 10 kaj 11 gajnis : S.ro G. De Groot, Torricellistr., 10, Eindhoven, kaj S.ro Alglave — 18, rue Latérale — Quiévrain.


KRUCVORTENIGMO

PROBLEMO 13

Ni forlotumos 2 premiojn inter la solvintoj, kiuj akiros la 8/10 de la poentoj. Ĉiu vorto valoras po 1 poento. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Decembro 1936, rekte al S.ro F. Volders, Bre-dastraat, 94, Antwerpen.

HORIZONTALALE

- 1) Sub influo de alkoholo — eco de la plej supra estaĵo.
- 2) Laŭte montri gajecon (R) — adverbo montranta.
- 3) Spiritaj vidoj — kiu kudras vestojn (R).
- 4) Diservo (R) — infanlito (R) — unua virino.
- 5) Fari aŭ peni fari la saman kiel iu alia (R) — peco el dupersona.



- ludo (R) — uzi, apliki por kontroli ĉu io estas taŭga.
- 6) malmoliginta haŭto sur mano aŭ piedo (R) — malsama (R).
- 7) Kolekto de vortoj.
- 8) Marhundo (R) — tro mallaŭte (mallonge).
- 9) Korala insulo (R) — ordiga numeralo — rava birdo vivanta en la marĉoj (R).
- 10) Sole — bonodoro — adverbo uzata kun alia vorto.
- 11) Menciita parto el verko de iu aŭtoro — muzikinstrumento.
- 12) Malgranda peco — ĝoja (R).
- 13) manko de sango (malsano) (R) — enirkarto (R).

VERTIKALE

- 1) Fari limon de io (R) — ritme movi sian korpon.
- 2) Pronomo (ne iu alia) — anagramo de tiu.
- 3) Legumo (vintra) (R) — ne permesi veni ie (R).
- 4) Ekipi (R) — ... de neĝo kovris la teron (R) — tera, kampa supraĵo (R).
- 5) Statuo, adorata kiel dio (R) — spaco (R) — plej malgranda ne dividebla parto de io (R).
- 6) Israelido (R) — metalo.
- 7) Somera legumo.
- 8) Esti maltrankvila pri io (R) — plej granda patrina virto.
- 9) Eŭropano (R) — scio (kapableco) (R) Diboĉa festeno (R).
- 10) Esp. intern. junularo (mallonge) — metalo, sed kun unu ŝanĝita litero (R) — interna korpopeco (R).
- 11) Legumo (R) — parto de infanlernejo.
- 12) Kokina kreitaĵo — ne ellasi (R).
- 13) Serioza — adverbo nombra.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Ranson, Hombekesche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. van Humbeekstr., 3, Brussel (West).
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Brussel. Nr 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.

AFDEELINGEN :

Aalst: « Pioniro ». Sekr.: Molenstraat, 30.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista ». Sekr.: Statiesstraat, 156, Berchem.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto-Grupo ». Cuido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. van Humbeekstr., 3.
Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekr.: Moeskroenstraat, 9.
Leuven: « La Nova Tagiĝo » Sekr.: Tienschestraat, 106. Sro Fr. Frantzen.
Oostende: « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Oudenburgsche stwg., 8.
Mechelen: « La Estonto ». Sekr.: Vekestraat, 25.
Roesselare: « Ruselara Esperantista Grupo ».

VERTEGENWOORDIGERS :

Assche: L. De Rop, Tenberg, 24.
Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.
Gent: F.ino J. Terryn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: C. De Boes, Wijnstraat, 81.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.
Vichte: G. Faveete, Statiesstraat.
Wilrijk: D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.

Ingevolge besluiten genomen tijdens de Kongresvergaderingen te Gent, betrekkelijk de werking en het beheer van den Bond, zijn al de groepen en vertegenwoordigers uitgenoodigd geworden hunne vraag tot aansluiting schriftelijk te vernieuwen.

Hierboven zijn alleen vermeld deze die hieraan gevolg gegeven hebben vóór 15 Oktober. De andere zullen opgenomen worden in de volgende nummers.

Een oproep is ook gedaan tot de personen welke bereid zijn de taak van vertegenwoordiger te aanvaarden in de plaatsen waar F.L.E. er nog geen bezit. Toetredingsbulletijnen hiervoor mogen aangevraagd worden aan het sekretariaat.

Café "Nieuwe Carnot"

FRANS NEEFS-D'HELDT
Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.
Salonoj por societoj — Malvarmaj
manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo.

DRUKKERIJ

★ Aŭtomata Presejo
H. BRAEKEVELT
Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.
Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.
Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.

LUOTA

1/8 pago: 50 fr. por 12 monatoj;
30 fr. por 6 monatoj.

"BREUGHEL"

SPIJS- en DRANKHUIS
Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken
Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.
(Brusela grupo Esperantista)



LUOTA

LUOTA

1/4 pago: 75 fr. por 12 monatoj;
50 fr. por 6 monatoj.